

ST. A. DOBRZAŃSKI.

Historiozofio de lingvo internacia.

S. Dobrzański

Varsovio—1912 j.

Eldono de Jan Günther.

Jan Günther



811.9 = 922



ST. A. DOBRZAŃSKI.

Historiozofio de lingvo internacia.

Diverssence kaj malklare rakontas la historio al ni pri tio, kiel homa gento kun peno transformiĝadis en socion. La scienco penetras cindrejon de la historio por trovi ie en profundo prafajron de sociaj sentoj; la scienco malligas implikitajn volvaĵojn de sociaj kunigiloj por ekkapti ĉi-tiun fadenon de socia instinkto, la fadenon, kies komenco ĉiam ŝajnas esti nekaptebla.

Sole kiam kolektiva memoro de la homaro helpis al ni per faktoj; kiam per voĉo de miljaroj ekparolis la tomboj de faraonoj pri grandiozaj faroj de militestroj kaj leĝdonintoj; kiam malkovrita sabla sino de Mezopotamio montris al ni nekonstantecon kaj alternecon de regno-kulturaj formaĵoj; kiam al niaj oreloj alvenis la eĥoj — nur eĥoj — de jam antaŭjar-

cente mortintaj rapsodoj pri herooj Helladaj; kiam estingiĝis la lastaj sangbriloj de jam subiranta suno de Romo kaj la elektrizita malluma, minaca atmosfero de mezepoko komencis formiĝi en tion, kio prezentas sin al ni kiel griza mateno de hodiaŭa tago, — sole tiam ni povas kun bona poeto-filozofo mediti pri mire-stranga sorto de la „ŝimo de l' mondo“. Per diverskoloraj makuloj ĝi kovris la teron kaj nomis sin per nomoj de popoloj, socioj kaj gentoj. Sed bazo de ili estas individuoj-homoj, kiuj alvenas al formado de sociaj organismoj kunrilatante per la lingvo.

Jes, lingvo ebligas socian ekzistadon; kaj poste kian gigantan rolon ĝi ludas en la civilizacio! Per ĝi ni amasigas trezorojn de la scienco kaj profitas de la fremda sperto de aliaj homoj. Ĝi transformas tutan mondon kaj ĉiun travivitan fakton en etan simbolon de sono, kaj ĝi fariĝas vera sintezo de la vivo. Ĉiu socio havas en sia lingvo kvazaŭ esencon de sia historio kaj signon kaj esprimon de sia nuntempa ekzisto; se oni volas ekstermi ian popolon, oni atakas antaŭ ĉio ĝian lingvon kiel signon de solidareco nacia. Sed ĉar lingvo estas esprimo de la nacia kulturo kaj de la nacia vivo, oni devas, por trudi ĝin al aliaj popoloj, konkiri tiujn-ĉi popolojn aŭ politike aŭ ekonomie aŭ intelekte, t. e. trudi al ili ankaŭ sian propran kulturon.

Historio pruvis tion dum multaj jarcentoj. Dum olimpaj ludoj la degenerinta nacio de grekoj laŭdis brue venkinton Flaminiuson; senzorgan gajecon de atena agapo jam superbruis la mezura paŝo de romana legionisto; jam Romo politike ekregis la mondon, sed kulture ankoraŭ regis ĝin Grekujo kaj

jen la antikva mondo havis du lingvojn universalajn: klasika lingvo latina estis lingvo de la politika vivo, kaj universala lingvo de la kultura vivo estis la greka. Du ĉi-tiuj lingvoj universalaj estis tiatempe simboloj de duopa ĝenerala konkero de l' mondo, atestante pri universala regado de la Roma Imperio kaj pri universala regado de greka kulturo.

Sed ni iru antaŭen. Ĉe fino de antikvaj tempoj ni vidas aliformiĝon de ekonomiaj vivbazoj, penetradon de barbaroj en organismon de la Roma regno; kaj fine subita invado de novaj etnikaj elementoj detruas antikvan Imperion. Novaj popoloj unuiĝas sub la sceptro de la Romaj Papoj, kiuj fariĝas estroj de la mondo en politika kaj spirita rilato. Ni vidas universalan regadon de la Roma Eklezio, la skolastika lingvo latina, kiu estis lingvo de la Eklezio, fariĝas tiam lingvo universala, ĉar ĝi estis simbolo, reprezentanta tiun forton realan, kiu sciis al militi la tutan mondon.

En pli proksima tempo, kiam sur kontinento de Eŭropo, dum kultura dormo de aliaj popoloj, Francando blindigis nobelaron de ĉiuj nacioj per brila kortega kulturo de Valois'oj kaj Bourbon'oj, kaj kiam poste ĝi komencis rompi absolutismajn kaj aristokratecajn antaŭjuĝojn, atakante ilin per la libera sed pure burĝa penso, — tiam Francando fariĝis nova, pseŭdo-klasika Grekujo de kler-epoko; ĝi ekregis intelektojn de societo en la tuta mondo; kaj tiam lingvo franca komencis ludi rolon de lingvo universala, ĝi disvastiĝis internacie kiel simbolo de intelekta subjuĝigo de Eŭropo per Francando.

De post tiu tempo forfluis multe da akvo kaj da sango, Lacigita per malfacila laboro, la gilotino

de Revolucio enkreskis jam en teron kaj kovris sin per rusto; ekverdiĝis herbo sur sangaj kampoj de Napoleonaj bataloj — jam ilin tratanĉis multpeza plugilo; trasonis kaj silentiĝis gigantaj rapsodoj, kiujn verkis la historio ĉe lulilo de nova epoko. Sub la protekto de burĝaj konstitucioj ĵetis sin en mondon libera konkurado kaj libera komerco, egaligante historiajn diferencojn de ekonomia evolucio de popoloj. La granda ekzekutisto de Eŭropo ricevis almonon de „granda venkinto de nacioj“; aperas „politika koncerto de regnoj“, kiu fariĝas simbolo de la koncerto de egalpezaj naciaj kulturoj. Ĉar en tiuj tempoj eĉ malgrandaj popoloj kaj nacioj politike al-militataj akiris kulturan sendependecon, kulturan aŭtonomion; ĉiu nacio nun estas memstara produktanto de sia kaj de ĉiuhoma kulturo. Tiu-ĉi kulturo ne estas nun fabrikata nur en la greka aŭ en franca lingvo, sed en cent apartaj metioj de nacia laboro. Sed la ŝajna sendependeco de ili ĉiuj estas samtempe reciproka dependeco inter ĉiuj, ĉar kultur-produktado de ĉiu nacio estas en senĉesa, neevitebla kontakto kun kultura laboro de aliaj popoloj. Tiu-ĉi mirinda solidareco de apartaj ekzistaĵoj fariĝas nun esenca kondiĉo de la progreso; ĉiu apartiĝo de tiu solidareco estas punata per stagnacio en evoluado.

La ĵus karakterizitaj novtempaj rilatoj interkulturaj estas fenomeno tute nova en la historio de la mondo. Ĉi-tiu diverseco en la unueco, ĉi-tiu reciproka dependo kun samtempa memstareco okazas unuafoje, kaj ili ne havas ekzemplon ĝis nun. Ĉiuj ĝisnunaj unuiĝoj kulturaj aŭ politikaj estis nur, kiel ni

vidis, — pli aŭ malpli daŭraj naciaj almlitoj. Nun malgraŭ pli fortaj rilatoj internaciaj, ĉiu nacio deziras vivi per sia propra vivo, kaj se ĝi profitas per laboro de aliaj gentoj, ĝi tamen asimilas tiun laboron, naciigas ĝin kaj faras ĝiajn rezultatojn siaj.

Nun ni alvenis al centra punkto de la problemo.

Komplikitaj kaj ĉiam plivastiĝantaj interkulturaj rilatoj de moderna tipo devas realiĝadi en ia lingva formo. La historio instruas nin, ke ĝis nun nur al rilatoj de intersocia vivo respondis speciala lingva formo: la lingvoj naciaj. Sed ĉiu lingvo natura estas signita per vivo de sia nacio, profunde kaj esence kunigita kun ĝi. Kiam aperas inter homoj sfero de rilatoj kun la karaktero tute nova, sfero de interkulturaj rilatoj de multaj kaj diversaj sendependaj nacioj, — tiaokaze la lingvo de tiuj-ĉi novaj rilatoj devas formiĝi konforme al principe malsama naturo de ili.

Tio-ĉi estas la fundamenta argumento, kiu ebligas enkonduki konkludojn rilate al ecoj kaj al la rolo de eventuala lingvo internacia. Ni povas antaŭe konstrui kvazaŭ matematikan ekvacion: kiel la esenco de nacia vivo rilatas al lingvo nacia, tiel la esenco de vivo internacia rilatas al eventuala lingvo internacia. Kaj ni rigardu. Se nacio estas ekzistaĵo individuala — ni vidas, ke ankaŭ ĝia lingvo estas ekzistaĵo individuala, devenanta el vivo nacia. Alie estas en sfero de rilatoj internaciaj: ili estas nur „funkcio“ de memstaraj akiraĵoj naciaj, kaj la formo lingva, respondanta al ili, povas esti nur „funkcio“ de naciaj lingvoj germano-romanaj, ĉar ili riprezentas

la naciojn, kiuj produktis tutan ĉi formacion de internaciaj rilatoj, tutan ĉi hodiaŭan kulturon.

Plue: ĉe lulilo de socia vivo ni vidis instinktan, senkonscian, blindan kaj senordan naturan verkadon de individuoj, — kaj ni vidas, ke ankaŭ tiaj samaj fortoj konstruas la lingvojn naturajn. Kiam do ĉe fundamento de hodiaŭa vivo internacia ni renkontas laŭcelan, konscian, organizitan laboron, ni tiam havas rajton konkludi, ke lingva flanko de tiu-ĉi speciala kaj rimarkinda vivo ankaŭ devas esti rezulto de ia konscia, laŭcela kaj pripensita laboro. Ni povas ankoraŭ returni la ekvacion tiamaniere: kiel rilatas nacia vivo al tiel nomata vivo internacia, en la sama rilato devas esti natura lingvo nacia kaj eventuala lingvo internacia. El ĉi-tiu ekvacio oni povas elkonduki karakterizitajn konkludojn por lingvo internacia. Antaŭ ĉio do, la hodiaŭa vivo internacia estas nenio alia ol nur helpa rimedo, kiun aplikas kaj utiligas la kreanta fajrero de nacia vivo, kaj tiel same la lingvo, kiun ekzistigos vivo internacia konforme al sia naturo, povas esti nur helpa rimedo de interkomuniko en internaciaj rilatoj, kaj neniam enbrulos en ĝi interna fajro de nacia spirito.

Kaj ankoraŭ unu gravan konkludon ni povas elkonduki el nia ekvacio. En principo kaj en deveno mem de hodiaŭaj interkulturaj rilatoj kuŝas memstarigo kaj liberiĝo kultura de apartaj popoloj. Kiam tiuj-ĉi rilatoj ordiĝos en ia formo lingva laŭ sia naturo, tiam ĉi-tiu speciale nova lingvo internacia estas ankaŭ memstarigo, sendependiĝo kaj liberiĝo de naciaj lingvoj — ĉar tiam malaperos bezono fariĝadi lingve ia alinaciano; la lingvoj iĝas sendependaj,

kaj revenos al sia natura fluejo nacia. Naskita el rajt-egaligo de tuta vico de hodiaŭaj grandaj lingvoj naciaj — la helpa lingvo internacia devas fariĝi plej potenca faktoro de pluaj rajt-egaligoj.

Tiamaniere, per vojo de dedukto, antaŭ ol koni eventualan lingvon internacian, kaj eĉ antaŭ ĝia efektiviĝo — oni povas esti koninta sufiĉe precize la naturon de ĝi. Detenante sin de pluaj teoriaj konkludoj, ni devas ripeti, ke 1) en nunaj rilatoj nenio lingvo nacia povas ludi rolon de lingvo internacia, ĉar ĝi estas organike netaŭga por tiu-ĉi celo; 2) ke ĝi devas esti laŭplana, racionala sintezo de german-romanaj lingvoj; 3) ke ĝia rolo povas esti nur helpa, kaj 4) ke direktante naciajn lingvojn al ilia natura destino en vivo nacia, ĝi kaŭzas, ke ilia evolucio estos pli normala.

Konkreta historio de helpa lingvo internacia donas al ni multajn ekzemplojn de serĉado de vojoj, kiuj alkondukis al sukcesa solvo de priparolata demando. Kaj tiuj-ĉi serĉadoj devis esti palpado en mallumo, provoj, penadoj; kiel diras Šiller, komece oni elĉerpis tutan eraron, antaŭ ol atingi belan celon de firma vero. Kelkaj centoj da provoj de tiu-ĉi speco montras al ni, kiel multe da laboro elspezis la homaro por solvi tiun-ĉi demandon, kaj kiel malfacile estis plenumi ĉiujn koncernajn teoriajn postulojn. Eĉ elpensaĵoj, kiuj de multaj vidpunktoj estis geniaj, devis tamen fali, se ili preterlasis unu el ĉi-tiuj postuloj; tiamaniere falis artefarita lingvo Volapük, ĉar ĝia kreinto ne komprenis, ke nur sur vojo de racionala sintezo de roman-germanaj lingvoj kuŝas la solvo de la enigmo. Estas afero eksterordinare

interesa, ke genia kreinto de Esperanto iris per du vojoj al la solvo de enigmo: lia intelekto travivadis praktike ĉiujn-ĉi blindajn, sensukcesajn provojn, kiujn travivis jam la homaro mem, kaj de alia flanko ĉi-tiu intelekto kun nekomprenebla divenemeco malkovris ĉi-tiujn principojn teoriajn, sur kiuj devis fundamente apogi sin por ĉiam kreitaĵo de tia speco. Kaj jen sur kuniĝo de ĉi-tiuj du vojoj ni trovas verkon kuriozan, realigon de revoj de la homaro de post Descartes ĝis Leibnitz kaj Max Müller, konkretigon de ĉiuj postuloj teoriaj kaj de tuta eksperimenta saĝeco. Skribante por esperantistoj, ni mallonge priparolos genian strukturon de la eksterordinare interesa koncepto filologia de la lingvo Esperanto, ni nur turnos atenton, ke ĝi estas ĝuste ĉi-tio, kion ni nomus laŭcela konscia sintezo en limoj de lingvo.

En dek ses reguloj resumas la gramatiko Esperanta fundamentan enhavon de ĉiu eventuala gramatiko de lingvo ĝenerale; kaj tio-ĉi estas laŭcela, racionala bazo ge ĝia konstruo; ĝia plejparte roman-germana vortaro, ensorbante ĉiujn jam pretajn lingvajn radikojn internaciajn, parolas al ni pri rolo, kiun ludis raso roman-germana en formado de hodiaŭa civilizacio; kaj la tuta materialo vorta fluas en frazoj per logika kaj libera torento de lingvoj slavaj; kaj aglutina karaktero de la vortfarado, aldonante al la lingvo flekseblecon kaj precizecon, kiujn oni povas vane serĉi en fleksiaj dialektoj eŭropaj, — estas ankaŭ ĉi-tiu nodo de parenceco, kiu kunigas lingvon Esperanto kun grandegaj familioj de aglutinaj lingvoj de Azio.

Tia estas nuntempe ĉi-tiu fondiĝanta novlingva formo de modernaj rilatoj internaciaj.

„Enigmo de lingvo internacia — skribas eminenta pola poeto, Antoni Lange — estas solvita. Definitiva, en limoj de homa povebleco, plej perfekta solvo de tiu-ĉi problemo — fariĝis hodiaŭ trezoro publika. Doktoro L. L. Zamenhof kreis lingvon, respondantan kiel eble plej bone al ĉiuj postuloj de lingvo internacia. Ĉiuj elpensadoj de tiu-ĉi speco de Descartes ĝis Max Müller kuniĝis en ĉi-tiun kvintesencon de la problemo, kiu nomas sin lingvo Esperanto. Estus falsa kompreno de afero, se oni konsiderus ĉi-tiun lingvon kiel produkton de cerbo de unu individuo. Individuo estas nur akumulatoro de energio kaj de celado de l' amaso; ĝi estas koncentriga punkto de homa kredo kaj volo ĝenerale, — kaj ofte tutaj jarcentoj de laboro kolektiĝas en individuo. Doktoro Zamenhof koncentris en sia cerbo la eternan deziron de homaro kaj trovis sekreton, por kiu oni laboris de preskaŭ kvar jarcentoj!“





Prezo 0.10 *ms*.

Presejo de L. Bogusławski, Varsovio, Św. Krzyzka 11.

